

starto★

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1972 8 (30)

Reprezentanto de DK KPC salutis la feston de EKP

SEPDEKJARA JUBILEANTO


Preskaŭ tri generaciojn aĝa Esperantista Klubo en la ĉefurbo Praha ĝisvivis la pluan rondciferan viv-jubileon ; la sepdekjarigon de tiu ĉi plej granda societo esperantista en Ĉeĥoslovakio rememoris la 25-an de novembro pli ol tricent esperantistoj inkluzive de eksterlandaj gastoj el Germana Demokratia Respubliko kaj Svedio. La solenaĵo sub la devizo "70 jaroj de Esperantista Klubo en Praha - 70 jaroj de la Neumann-eca tradicio" okazis en la kulturdomo "Gong", Praha-Vysočany.

Post inaŭguraj vortoj de la kluba prezidanto Josef Drlík salutis la ĉeestantojn reprezentantino de Distrikta Komitato de KPC Praha-9, Marie Vodičková. Montrinte sian sinceran admiron por la esprimeblecoj de la Internacia Lingvo, tiu "latino de proletaro", kiel ŝi diris, ŝi akcentis, ke nia socio kalkulas ja la helpo de la esperantistoj, kiuj supozeble altigados siajn fakajn konojn precipe kiel progresemaj popolanoj de la socialisma ŝtato.

La poemon de Stanislav Kostka Neumann "Printempa anonciacio" en la traduko de Jiří Kořínek prezentis Olga Šádková.

La ĉefparoladon liveris Josef Vítek, la prezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Li rememoris la kunfondinton kaj komitatanon de Esperantista Klubo en Praha, glorran revolucionan poeton Stanislav Kostka Neumann, kies personeco sendube pioniris ĉe la unuaj paŝoj de la klubo ne unufoje suspektata de la monarkiaj aŭtoritatoj pro sia politika avangardemo kaj fine, en 1914, dissolvita ...

Sed ne nur al pasinteco reiris liaj vortoj. Ili turnis la atenton de la publiko al la aktualaj problemoj de multlingveco. Tiu ĉi kolosa ŝarĝo de la moderna hom-



aro surpronis diversajn aspektojn : ekonomian, politikan, psikologian. Kun la daŭre kreskantaj internaciaj rilatoj la bezono de unu neŭtrala komuna komprenilo estas ĉiam pli kaj pli sentebla. Helpi la solvon de la monda lingvoproblemo estas la precipa tasko de la Esperanto-movado.

En la kultura parto de la festo oni spektis kelke da aranĝoj. Sian poemon "Homoj" deklamis konata esperanta poetino Eli Urbanová. Pri la kontribuo de Esperanto al la ĉeĥa nacia kulturo parolis d-ro Vlastimil Novobilský CSc.

Muzike rolis d-ro Pravoslav Sádlo, violonĉelisto, plue Miroslav Smyčka, membro de la Operdomo en Ústí n. Labem kun pianakompano fare de la konservatoria profesorino L.Šimková kaj de la ĉefa muzik-direktanto de la Muzikteatro M.Homolka.

"Mesagon de la infanoj", kiun por tiu ĉi okazo verkis D-ro Pumpr, kun unika ĉarmo kaj en perfekta Esperanto prezentis 25membra kolektivo de etaj lernejoj kun sia instruistino M.Juřenová. Bedaŭrinde la aŭtoro ne povis jam vidi tiun ĉi prezentadon.

La amatora folkloro trupo PAL el Praha-Kbely sub la gvido de V.Šolc ravis per siaj popolaj dancoj, kantoj kaj muziko.

Gratulletero de d-ro Ivo Lapenna

La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, prof.d-ro Ivo Lapenna, sendis okaze de la jubileo gratulleteron al EKP, en kiu li skribas interalie :

"Mi ĉiam rememoras kun kortuŝo kaj simpatio la grandan kunvenon, en plenŝtopita salonego, kiam vi kolektiĝis okaze de mia prelego antaŭ kelkaj jaroj... Inter la lokaj Esperanto-societoj via Klubo ĉiam ludis aparte elstaran rolon kaj mi deziras gratuli al la Klubo kaj al ĉiuj ĝiaj membroj en la nomo de UEA kaj en mia propra la jubilean datrevenon. Tiuj gratuloj rilatas ankaŭ al la tuta laboro de via Klubo dum plenaj 70 jaroj, kaj ili inkluzivas bondezirojn por same brila agado ankaŭ en la estonteco!"

/knl/



Etaj lernejoj sub la gvido de M.Juřenová prezentis "Mesagon de la infanoj".

Ĉs.Porpaca Sekcio eldonis trikoloran insignon de M E M. Havebla en la sekretariejo de ĈEA. La prezo 6 Kčs.

Zamenhof kaj la nuntempo

Oni emas taksi la homon laŭ lia verko; sed ofte okazas, ke la verko superregas la kreinton tiom forte, ke li eĉ komencas esti influata de sia propra kreaĵo. Simile estis pri la lingvo internacia Esperanto finkonstruita antaŭ 85 jaroj kaj pri lia aŭtoro, mortinta antaŭ 55 jaroj, sed ĝisvivinta ties disvastigon.

Kiam la noble modesta okulisto Zamenhof kreis sian internacian lingvon, li mem eĉ ne supozetis la revolucion, kiun li per sia verko kaŭzos. Estis tragika dialektiko de Zamenhof, ke li - revoluciulo en teorio kaj praktiko de la internacia komunikado - estis utopiulo en sia propra humanisma ideologio.

D-ro Zamenhof konsideris la lingvon, kiun li kreis, ne nur kiel internacian komunikan rimedon, sed ankaŭ kiel ideologion. Dekomence li batalis - ofte kun stranga obstino - por la "interna ideo" de Esperanto kaj de esperantista movado. Tiu ĉi "interna ideo", en si mem nobla kaj respektinda, bedaŭrinde false respogulis la verajn kaŭzojn de la nacia subpremado, vidante ilin nur en lingva nekompreneblo. D-ro Zamenhof estis granda kaj sincera humanisto, kiu proprahaŭte eksentis kruelaĵojn de rasismo, naciismo, milito, sed li ne povis kompreni la sociajn legojn, kiuj tiujn ĉi kruelaĵojn kaŭzas kaj influas.

Estis feliĉe, ke la esperantistaro mem sukcesis malebligi al D-ro Zamenhof, ke li kunligu siajn proprajn utopiismajn ideojn de la "abstrakta" homaranismo kun tiuj de la internacia lingvo. Esperanto sekve restis tio, kio ĝi estas ĝis nun - internacia lingvo de ĉiuj, kiuj komprenas ĝian veran internan valoron logikan kaj komunikan.

Tamen la "interna ideo" de paca kunvivado de la nacioj ne estas morta. Se ni, esperantistoj, deziras plenumi tiun ĉi humanisman idealon de Zamenhof, ni devas kunligi nian laboron por la internacia lingva komunikado ankaŭ kun la batalo por la moderna humanismo de nia epoko, por la socialismo kaj paco. Nur tiel ni povos renversi la zamenhofan utopion en la realon. (jj)

Rondeta vivo

B R N O - Solena koncerto omaĝe al la 85-a jubileo de Esperanto okazis ĉi tie la 14an de nov. sub la gvido de prof. V. Scheiber. La konataj gekantistoj de la moravia ĉefurbo prezentis ĉe la vespero erojn el operoj de la mondfamaj aŭtoroj, ĉeĥaj kaj alilandaj. Enkondukis la programon J. Vondroušek.

J A B L O N E C n.N. - Okaze de sia 7-jara datreveno la klube preparas solenan kunvenon por la 20a de januaro 1973. Samtempe ĝi planas malfermon de internacia ekspozicio de afiŝoj kontraŭ la milito en Vjetnamio sub la aŭspicio de la Distrikta Packonsilantaro. La EK-estraro petas tiurilate helpon de la esperantistoj tutmonde.

P A R D U B I C E - EK intencas aranĝi venontjare societan vesperon (24.2) kaj amikan renkontiĝon sur la Kunĉiĉká hora (26.-27.5.)

P R A H A - Programo pri Kubo surbendigita de O. Kníchal dum lia restado en tiu ĉi lando rondiris kvar E-rondetojn en ĈSSR. Plue havebla ĉe EKP.

Ŭ S T Í n. Labem - Vespero rememore al d-ro Tomáš Pumpr okazis la 16.11. en muzik-ĉambro de la urba kulturdomo. Enkonduke d-ro Novobilský skizis la portreton de la eminenta esperantologo. Sekvis arta programo kun operarioj - tradukitaj preskaŭ senescepte de d-ro Pumpr - fare de la lokaj operkantistoj. En la recita parto M. Smyčka prezentis du poemojn de P. Bezruč, Věra Novobilská la poemon de J. Neruda kaj Jiří Kořínek laŭlegis sian propran poem-dediĉon al la karmemora honorigito - "Lasta Bukedo".

La programon spektis 30 esperantistoj el Ŭstí, Teplice, Lovosice, Litoměřice, Třebenice, Most kaj Kolín. Raportis detale pri la vespero "Průboj" regiona organo de KPĈ.

Samideana kroniko

Vladka kaj Jiří N o h ý n e k, anoj de EK Mělník ZDŠ Jungmannovy sady geedziĝis la 20.10. Koran gratulon!

MUDr. Matěj R a d a, kuracisto el Vysoké apud Mělník forpasis 23.10. en la aĝo de 77 jaroj. Honoron al lia memoro!

VERDA KAJ RUĜA KOLOROJ EN LA HISTORIO DE ESPERANTO

Ekde la momento, kiam Esperanto enradikiĝis en la socio, ĝi ĉesis esti nura lingva fenomeno kaj fariĝis ilo en la manoj de malsamaj sociaj grupoj - ofte spite al deziroj de la esperantistoj mem. Kiel skribas Ulrich L i n s en sia studo "Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo" (publikigita en "L. Omnibuso"), se multaj esperantistoj distancigis sin de politika "misuzo" de Esperanto, ili per tio proksimiĝis al perfido de siaj proklamitaj idealoj: servi al la internacia kompreniĝo kaj al tutmonda paco.

En la jaro 1911, daŭrigas Lins, iu rusa poliestro ordonis, ke oni "detruu afiŝojn en Esperanto, ĉar la loĝantoj ne komprenas ilin" kaj la UEA-delegito en Kronŝtadt estis eĉ arestita pro disvastigo de la lingvo. Samjare la gvidanto de grupo en Mukdeno (Ĉinio) estis kulpigita kiel revoluciano, ĉar "li adoras Tolstoj kaj Esperanton", kaj saviĝis nur per fuĝo. Kaj en la parlamento oni pridiskutis okazaĵon en la urbo Székesfehérvár, kie polickapitano malpermesis al laboristoj lerni "tiun ŝtelistan lingvon", kiun la "labordonantoj ne komprenas".

Post la unua mondmilito komenciĝis pli grandskalaj atakoj de reakciaj rondoj kontraŭ la Internacia Lingvo. Ju pli ĝi trovadis la lokon en la socio, dank'al la fondiĝo de SAT, ju pli ĝi ĉesis esti ignorebla ludaĵo, des pli ĝi altiris la suspekton de tiuj, kiuj timis precipe internacian klasbatalon.

"Venos tempo, kiam oni timos Esperanton, oni ĝin malamos pro la forte ligitaj kun ĝi ideoj de la frateco", diris la franca verkisto H. Barbusse. Kaj baldaŭ pruvis la vero, ke la burgaj esperantistoj mem ektimos la valoron, kiun Esperanto havas en la manoj de laboristaro: la industriisto A. Steche, prez. de Germana Esperanto-Asocio alarmis en 1922 kontraŭ "influoj malamikaj al popolo kaj ŝtato" en la E-movado, alvokante la registarojn "zorgi pri tio, ke naciece pensantaj popolanoj trovu ĉie okazon senpage lerni Esperanton", kaj ke "ili estu edukitaj ne nur kiel esperantistoj, sed ankaŭ kiel socialdemokratoj".

La aŭtoro de la studo montras, kiel sub influo de la onidiro pri enkonduko de Esperanto en sovetajn lernejojn la franca ministro pri publika klerigo L. Bérard sendis la Jan de junio 1922 cirkuleron al ĉiuj rektoroj de la francaj universitatoj, kiu malpermesas instruadon de Esperanto en ĉiuj ŝtataj lernejoj - pro la "danĝeroj", kiujn la lingvo "ŝajnas enhavi dum la nunaj cirkonstancoj".

Kvankam la "neŭtralaj" esperantistoj rapidis certigi, ke Esperanto ne respondecas, se "ŝtelistoj kaj banditoj uzas ĝin", Bérard faris eĉ pli por malhelpi ankaŭ la burĝan movadon: laŭ liaj instrukcioj la franca delegito en la Ligo de Nacioj, filozofo H. Bergson, kiu pli frue simpatiis kun Esperanto, devis interveni, por ke la komisiono por intelekta kooperado rifuzu studi la demandojn de artefarita lingvo. Antaŭ la sama forumo brazila ministro akre atakis Esperanton kiel "lingvon de mizeruloj kaj komunistoj".

Hungaraj aŭtoritatoj disponigis konkretan sperton pri "danĝero" de Esperanto, ĉar la lingvo estis preskaŭ oficialigita dum la Hungara Soveta Respubliko (1919). Dum la 21-a UK en Budapeŝto (1929) la polico malpermesis deklamadon de poemoj de Petöfi kaj en 1934 Hungara E-Societo Laborista estis disolvita pro agado "kontraŭ sociklaso, religio kaj nacio".

Dank'al adaptiĝo al la cirkonstancoj la samjare reorganizita "neŭtrala" movado sukcesis ĝui iom da subteno. Fervore certigante sian lojalecon al la reĝimo la neŭtralaj esperantistoj tiuokaze sukcesis sin ŝirmi kontraŭ malutilaj postefikoj.

NI ANKORAŬFOJE ATENTIGAS, KE LA KONKURSO EN PROZO PROKLAMITA DE STARTO (n-ro 1/72, pĝ. 6) ESTAS DAŬRIGOTA ĜIS LA JARFINO 1 9 7 2 !



SIGNALILO

FERVOJISTA
SEKCIO
DE ĈEA

TAGO DE FERVOJISTOJ

Ĉiujare la 27.9.nia "blua armeo" en Ĉeĥoslovakio festas la "Tagon de fervojistoj". Ĝi estas la okazo por resumi la rezultojn de la respondeca laboro de la fervojistaro, kiu signifoplene kontribuas al realigo de la ŝtata plano. Ankaŭ

ni, fervojistoj-esperantistoj, sincere ĝojas pro la rezultoj atingitaj kaj promesas ĉiam klopodi, ke nia laboro estu ankoraŭ pli fruktodona.

RAPIDE - MALMULTEKOSTE - SEKURE ! Tio estu la celo kaj devontigo de ĉiu fervojisto-esperantisto ! /Jé-eS/

125 JAROJ DE LA FERVOJNODO OSTRAVA

La lan de majo 1848 alveturis la unua vaportrajno en la stacion Ostrava. La stacio, 446,5m longa, havis tiam nur 6 trakojn kaj 11 trakforkojn. Al ĝi apartenis ankaŭ lokomotivejo por 9 lokomotivoj kaj lokomotiv- kaj vagon-riparejo.

Sed la karbo kaj fero el la apuda Vítkovice ĉiam pli kaj pli bezonis fervojon. Jam en 1859 estis finkonstruita la dua trako inter Ostrava kaj Bohumín. En la jaro 1862 ekfunkciis mineja fervojo Ostrava-Michalkovice, kiu estis plilongigita dek jarojn pli poste al Doubrava kaj konektita kun la fervojlinio Bohumín-Košice. La linio Ostrava-Frydlant kunigis la minejan urbon kun la montaro Beskydy en 1871.

Inter 1890-1901 en Ostrava oni konstruis dekstran kaj maldekstran antaŭstacion por ŝarĝ-traĵnoj. Ankaŭ la mineja fervojo ricevis propran ŝarĝstacion. Tiel elkreskis la Ostrava-fervojnodo. Nuntempe ĝi estas rekonstruata kaj modernigata por pli bone servi al karbominejoj, ferfabrikoj, al la tuta loĝantaro de la "nigra Ostrava", sed ankaŭ al la transporto inter oriento kaj okcidento de nia ŝtato.

Sláva David

ER Amikeco en Ĉ. Třebová atentigas ĉiujn geamikojn, ke la jam anoncita Esperanto-balo okazos la 3an de februaro 1973. Ĉiuj estas kore invitataj !

Fervojista sekcio de ĈEA deziras al ĉiuj siaj anoj ĉion bonan kaj multe da belaj kaj fe-

liĉaj tagoj en la nova jaro !

F e r v o j i s t a h u m u r o

Trajnrevizoro : "Ĉu vi pagis por la hundo ?"

Pasaĝero : "Ne, sinjoro revizoro, mi ricevis ĝin tute senpage !"

Teknikista sekcio invitas interesitojn

Komence de novembro aperis nova numero de "TS Informas". Krom sciigoj el la sekcio ĝi alportas adresaron de la membroj kun ties fak-indikoj, tripaĝan matematikan ĉeĥa-esperantan vortaron k.a. En la regula rubriko "Kiel ni diru..." ĝi prikonsideras E-terminon por "saponát".

La sekretario de TS atentigas,

ke ekde tiu ĉi n-ro la informilon ricevas nur 40 membroj kaj kunlaborantoj /3-4 n-roj por 8 Kčs pojare/.

Se vi interesiĝas kaj pri Esperanto kaj pri tekniko, ni rekomendas al vi aniĝi al TS, aŭ almenaŭ por vi mem ev. por via E-grupo mendi la sekcian bultenon ĉe la sekretario inĝ. Jan Werner, Kroftova 84, Brno 16.

Kiam mi antaŭ dek jaroj tralegis konatan libron de Jarmila Glazarová pri la belaĵoj kaj memorindaĵoj de Leningrado, mi ekspiris persone konatiĝi kun tiu ĉi heroa urbo, kiu dum la dua mondmilito naŭcent tagojn rezistis al furioza blokado de la nazioj. Mia sopiro plenumiĝis nunjare komence de aŭgusto, kiam mi profitis la okazon partopreni kelktagan ekskurson, kiun por la mezlernejaj profesoroj el la regiono Karlovy Vary aranĝis ĈEDOK.

La vetero en Prago ne estis favora. Sed kiam ni post duhora flugo alteriĝis en Leningrado, la suno malavare elsendadis siajn varmajn radiojn. Akceptis nin simpatia kaj bela gvidistino de Inturisto, reganta senriproĉe la ĉeĥan. Ŝi kore bonvenigis nin en la urbo de Leniŝ, dezirante al ni agrablan restadon.

Ni forveturas al la Finna Golfo en la modernan restoracion VOSTOK situantan sur la bordo proksime de la banejo, kiu estas el ĉiuj flankoj plene okupita de la leningradaj laboristoj. Ili venadas tien ĉi refreŝiĝi kaj ripozi. Ankaŭ ni ekdeziris obligi iliajn vicojn, sed la ekskursita ordo devigas nin eksidi por vespermango. La manĝaĵo estas vere bongusta kaj abunda: sardinoj, pano kun butero, barĉo - la viando kun terpomoj kaj brasiko, bonega nigra kafo kun pirogoj.

Poste ni veturas en la hotelon. Ĝi estas SPUTNIK, unu el la plej modernaj hoteloj en la urbo, antaŭnelonge konstruita, proksime de la parko Sosnovka en la kvartalo VYBORGSKAJA.

Nia verkistino neniel troigis, skribante pri la belaĵoj de Leningrado en superlativoj. Nin ĉiuj precipe surprizis granda pureco ĉiuloke. La stratoj maze de la urbo estas plenaj de homoj. Same la vendejoj. Longaj vicoj staras ĉe la trinkaĵ-bufikoj kaj ĉe la migrantaj bufedoj kun "kvaso" - nealkohola trinkaĵo preparata el nigra pano. Ankaŭ la vendistoj de glaciaĵoj estas multe okupataj...

Ni iom miras, ke en la stratoj estas videblaj relative malmultaj infanoj. Ni tamen baldaŭ konsciis, ke estas ferioj kaj ke preskaŭ ĉiuj etuloj - kiel al ni klarigis nia gvidistino - estas en la provinco ĉe la parencoj aŭ en diversaj infanaj tendaroj. La soveta ŝtato modele zorgas pri la sanstato de sia juna generacio kaj atentis, ke estu sufiĉe da infanaj parkoj, ludejoj, tendaroj kaj diversaj aliaj aranĝoj. Ekzemple la Primorski-parko, de kie proksime situas la restoracio Vostok, estas grandega areo kun miloj da arboj, ludejoj kaj vico da amuzaĵoj por la infanaro. La leningradanoj plene eluzas tiun ĉi lokon, precipe sabate kaj dimanĉe.

• • •

En nia hotelo estas granda restoracio kaj bufedo en la parteroj kaj en la kvinna etaĝo. En la teretaĝo oni povas aĉeti gazetojn (eĉ la ĉeĥajn), bildkartojn kaj memoraĵojn. Sed malgraŭ tropika varmego, en Leningrado nekutima, ni povis vespere ricevi nek bieron nek mineralan akvon. Ĉio ĉi estis elvendita. Mendebaj estis sole teo aŭ kafo - do la trinkaĵoj, kiujn mi neniam vespere konsumas, ĉar mi poste malbone dormas.

Tial komune kun unu juna profesoro ni decidis veturi aŭtobuse al la proksima restoracio ie en la urbocentro. Ni venis al la haltejo, kie staris kelke da virinoj kaj demandis ilin, kie oni vendas bieron. Sed ni faris malbone. Anstataŭ ricevi respondon, ni estis devigitaj aŭskulti klarigojn pri pereiga influo de alkoholo. Trinku akvon, se vi ne emas kafon aŭ teon, estis ilia konsilo. Ne niom valoris niaj kontraŭdiroj, ke glaso da biero ne povas malutili. "Ni ja konas tion", rediris ili, "per unu biero oni komencas kaj kutime malbone finas".

Ni do pentis kaj revenis en niajn ĉambrojn, kie ni estingis nian soifon, trinkante filtritan akvon el Nevo. Tro bona ĝi ne estis, sed ni dormis bone. Se ni estus en Leningrado pli longe kaj aŭskultus ankoraŭ kelke da similaj instruoj, versajne ni iĝus abstinuloj. Domage, ke nia abstinenca asocio ne havas tiel elokventajn laborantinojn.

Trad. J. Hoffner

SOFIO - La nova ministro por klerigo en Bulgario rekonis publike la valoron de E-o. Rilata al la internacia Pedagogia Eksperimento (PDE) estis eldonita ministeria dekreto kaj klaraj preskriboj por eklaboro de pliaj 3 novaj eksperimentaj klasoj. La instruistoj en PDE en Bulgario ricevos je 5% pli altan salajron.

Nikola Aleksiev, la prezidanto de BEA kaj de MEM, estis elektita en la estraron de la Patrolanda Fronto de Bulgario (organo analogia al la Ĉs. Nacia Fronto.

BEOGRADO - Dum interparolo pri la venonta UK en Beogrado kun la ĉefo de sia kabineto, la jugoslavia prezidento Tito konfesis, ke li regule legas la jugoslavian kulturrevuon "Suda Stelo". Tito lernis Esperanton antaŭ 40 jaroj.

BUKUREŬTO - Lastatempe aperis "Manual de Limba Internationala Esperanto" de prof. J. Petrin, la unua Esp. lernolibro por rumanoj post la dua mondmilito.

BONN - Germana Esperanto-Asocio sin anoncis ĉe la prezidanto de la Federacia Parlamento von Hassel por registriĝo en la listo de reprezentitaj asocioj aŭ firmoj ("premgrupoj"), ĉar estas unu el la plej gravaj taskoj de GEA influu parlamentanojn favore al Esperanto.

LISBONO - Post 24 jara malpermeso la portugala Konsilantaro pri Edukaj Aferoj anoncis, "ke estas permesita la instruado de Esperanto en Portugalio". Tuj post la anonco komenciĝis kurso por 25 lernantoj en la privata Centro por Elementa kaj Perfektiga Lingvo - Instruado en Lisbono.

BOGOTO - La ĵurnalo "El Colombiano" en Medellín kaj "El Espectador" en Bogoto aperigis plurajn artikolojn tre favorajn al IL. En Medellín okazis koresponda kurso kaj kurso en la "Universidad Pontificia Bolivariana" kun pli ol 500 interesitoj.

OSLO - Tamiko Kawakami, studentino kaj bibliotekistino intencas viziti per helpo de Esperanto Afrikon fine de decembro. La junulino jam pasint-

Verda agentejo raportas

somere vizitis Usonon, Kanadon, Meksikon kaj plurajn aliajn sudamerikajn landojn. Antaŭe ŝi vizitis trifoje Sovetan Union kaj la tutan Eŭropon. Ŝi estis intervjuata de pli ol 60 ĵurnaloj kaj de radio- kaj televid-stacioj.

KOPENHAGO - "ABZ" de Amo" de la danaj psikologoj Sten kaj Inge Hegeler, unu el la plej vendataj gvidlibroj pri sekso en Danlando, estas nun havebla en IL. La libro havigas konsilojn kaj difinojn de la seksaj terminoj en enciklopedia formo.

MOSKVO - La sovetia poeto M. Isakovskij, aŭtoro de la konata kanto "Kattjusa" eldonis antaŭnelonge sian biografion, en kiu li dediĉas apartan ĉapitron al sia esperantistiĝo en la junago.

LINGVA AMBICIO - SCIENCA MALUTILO

Ĉagrenas multajn francojn, ke 60 % de ĉiuj sciencaj informoj aperas en la angla kaj nur 10% en la franca lingvo. Krome iuj francaj sciencistoj publikigas rezultojn de siaj esploroj en la konkurenca lingvo angla. Pro tio Asocio de universitatoj okazigos fine de 1973 semajnon de la franca libro en ĉiuj "frankofonaj" landoj, kiel sciigis "Le Monde".

Tiu nova franca aktivado certe kontentigos nacilingvajn ambiciojn, sed apenau helpos scienccon. Tamen ĝi certe kontribuos al tio, ke la kondiĉoj sur la lingva merkato akriĝos kaj igos la tempon pli matura por definitiva solvo de la internacia lingvo-problemo.

(laŭ Interlingvistika Informa Servo)

ĈU VI JAM PAGIS VIAN MEMBRONKOTIZON AL Ĉ E A POR LA KURANTA JARO ?

Korespondi deziras

SOVETUNIO - Korespondanancojn kun deziro leterkontakti kun la litovaj esperantistoj senpage publikigos porlernanta gazeto **MOKSLEIVIS** /Vilnius, 232000, Komunaru 8/10/ o **JASTUNAITE** Irena, str. Aguonu II. stg. 8, Panevežys kaj **MALČIAUSKAITE** Valda, str. Nevežio 35-31, Panevežys 235 300, ambau Litovio, USSR o Ramutis **KILČIAUSKAS**, 235300 Panevežys, Bites 11a-1, Litovio o **A.J. BERREKA**, pr. Lenina, 12b., kv. 20, Nikopolo-13, Ukraina SSR o Grigorij **GERICHOV**, Kazachskaja SSR, Alma-Atinskaja obl., Tallar - 2, Kommunističeskaja 278.

HUNGARIO - Ilona **INÁNCZI** 21j. Kecskemét, IV ker., Szepes u. 8 o Gimnaziano János **GÁBOR**, Kecskemét, Zója u. 9 sz. o Ilona **BIRÓ**, Budapest XIX. k. Simonyi Zsigmond u. 43.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO - Hans-Jürg **KELPIN**, 37j. pastoro, kursgvidanto, DDR-5211 Dienstedt Rudolstädter Str. 3. o Geknaboj 13-14jaraĵ kun sia instruisto L. Schödl 195, Neuruppin, Rosa-Luxemburg-Str. 37.

POLLANDO - 200 gejunuloj en aĝo 16-30j. kun la ĉefaj gejunuloj pri ĉ.t., i.a. pri reciprokaj vizitoj : Junulara E-Rondo, Wrocław-17, str. Dubois 3 o Margareta **ROŻALSKA**, 28j. frizistino, Kielce, ul. Rewolucji Październikowej 14/13. o Wiesław **MAZUREK**, 18j. stud., Bychawa; woj. Dublin, pri ĉ.t. o Zbigniew **CZARNNIECKI**, 17j. lernanto, Wrocław 17, str. Dubois 8/6 /muziko, gramofondisko/

RUMANIO - Vilmos **TORRÓ**, pentristo 37j., str. Zorilor 1, Covasna o d-ro Rosetel **PRODĂNESCU**, c.l. 5817, Bucuresti 61.

E-radioamatoroj, mia stacio funkcias nuntempe sur 15,20 kaj

40m ondozonoj/nur telegrafe/.M. I. Popescu, YO 3 PI, P.O. Box 205 Bucuresti 1.

KUBO - Prof. Moŝe **ASIS**, Rabí 655 La Habana 5.

NEDERLANDO - J.C. van der **WEÏDEN**, 50j. maŝinkompostisto, Arno 1, Amstelveen. Kun progresema virino, fraŭlino /viro, fraŭlo/ ĝis 40j. Reciprokaj vizitoj eblaj.

AŬSTRALIO - S-ro Marcelo **LEE-REVELD**, lingvofakestro ĉe Caulfield Grammar School, 217 Glen Eira Road, East St. Kilda, Viktorio-3183 serĉas leterkontaktajn por siaj geknaboj 11-16j. Ĉiuj ŝatus interŝanĝi bk., desegnaĵojn, sonbendojn, monerojn ktp. Skribu individue aŭ grupe.

Ĉ S S R - Marie **POLÁŠKOVÁ** sciigas sian novan adreson : Jablonová 22, Vsetín o Mi aĉetos po unu ekz. de tiuj ĉi revuoj : Afrika revuo/Kongo/, Lerneja E-revuo/Argentino/, L'Esperanto, Itala Fervojo, Hungara Esperantisto, Boletín /hispa./, Austria E-Revuo, Nederlanda Esperantisto /B. Sochor, Krásná Studánka 108, Liberec/. o Adresŝanĝo : MUDr. Vlast. **NEKUDA**, 683 32 Brankovice 271 o Vyškov.

SE VI DEZIRAS programojn en la internacia lingvo Esperanto, vi efike povus influ la aŭtoritatojn en Radio de Svedio, skribante mallongan leteron aŭ poŝtkarton kun propono al s-ro Bengt Jaerrel, Dir. de RS-progr., S-105 10 Stokholmo, Svedio. Se vi jam pli frue skribis, reskribu nun, ĉar tri novaj radiostacioj por eksterlando estas ĵus instalitaj. Via letereto povas gajni al mi unu programon en Esperanto. **AGADGRUPO POR ESPERANTO**, Box 55028, S-400 53, Göteborg, Svedio.

HEROLDO DE ESPERANTO abonebla por vi kaj por viaj amikoj en la soc. landoj ĉe : Ivo Železný, p.k. 7, 15000, Praha 56, Ĉeĥoslovakio.

INDEKSO

1972

STARTO - eldonas ĈEA, p.k.8 120 21. Aperas 8-foje jare. Resp. redaktoro O.Kníchal. Red.komitato : ing.E.Felix, J.Mařík, ing.F.Sviták. Abonebla por la asociaj membroj. - Dohlédací pošta Praha 07, sníž.pošt.poplatek pov.ŘP Praha j.zn.P/1-2283/71 ze dne 6.5.1971. Toto číslo předáno do tiskárny 30.listopadu 1972.

	n-ro/paĝo
VJETNAMIO KAJ LA PORPACAJ AKTIVECOJ	
Kampanjo "Vjetnamio" sukcesa /knl/	1/1
Ĉs.esperantistoj al la batalanta Vjetnamio /knl/	2/1-2
Ĉs.esperantistoj za mir vĉ Vietnamu /T.Balda/	5/1,6
La helpo al Vjetnamio daŭras	7/5
Porpaca renkontiĝo en Mělník /O.Kníchal/	7/2
POLITIKAJ GLOSOJ	
Alvoko el Praha /sv/	1/2
Příliš mnoho politiky ? /knl/	1/2
Konscienco de nia epoko	3-4/1
Socialistická společnost a mezinárodní jazyk /J.Drlík/	7/1,5
Zamenhof kaj la nuntempo /jj/	8/3
ORGANIZA VIVO, KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ	
Ĉu ni konstruos nian propran hejmon ? /kr/	1/8
Lerni el siaj propraj mankoj /K.Kraft/	2/5
Kun klara perspektivo	3-4/2
Slovakaj esperantistoj kongresis /D.Kočvara, knl/	3-4/4
Ni kreu organizon kun altaj pretendoj... /K.Kraft/	3-4/4
Konferenco en Berlino	3-4/4
Ankoraŭ pri la elektoj en Londono /W.Bormann/	3-4/9
Významná iniciativa libereckých /k/	5/2
Rekomendo de laborkonferenco en Most	5/2
Bulgara kongreso en Smoljan	5/2
Esperantistoj a Národní fronta /Ba/	6/2
Reprezentantoj de 40 landoj en Portland	6/4
Junulara kongreso en Toruń	6/4
Hungara Kultur-Festivalo /Tom/	6/5
Sepdekjara jubileanto /knl/	8/1,2
Junulara seminario en Rejdice /k/	7/6
INSTRUADO, "SET"	
Seminario pri korespondaj kursoj /knl/	2/4
SET dudekjara /O.Kníchal/	3-4/3
Junularo regas en SET /E.Felix/	5/3
Margene al SET /jelĉ/	6/1
Bona ŝanco por la slovaka movado	6/5
Pli alta instrunivelo en Lančov /fx/	6/10
Ankoraŭ unufoje SET /Th.Kilian/	7/6
FAKOJ	
Esperantista triumfo en Martin	1/3
Interese pri natursciencaj aktualaĵoj /E.Felix/	1/7

Ĉeĥa klasikulo surscenigita en Esperanto /O.Kníchal/	2/3
Politeknika vortaro preparata /A.B./	3-4/6
Geologio internacia /jm/	6/9
Teknikista sekcio invitas interesitojn /J.Werner/	8/5
SIGNALILO /rubriko de Fervoja sekcio de ĈEA/	2/6,6/11,7/7,8/5

ESPERANTOLOGIO, LINGVAJ DEMANDOJ

Ni havas kanonon /J.Mařík/	5/4-5
Eblecoj kaj realeco de la Internacia Lingvo /D.Blanke/	6/8-9
Verda kaj ruĝa koloroj en la historio de Esperanto/U.Lins/	8/4
Povas helpi pozitiva kritiko de ĉiuj /J.Černý/	3-4/7
Lingva konsilanto /V.Pechoč/	2/7
Konfuziĝo kun majuskloj /V.Pechoč/	7/7

JUBILEOJ, NEKROLOGOJ

Memore al R.Burda /k/	3-4/6
Jubileo de Miloš Lukáš /k/	5/3
Esperanto okdekkvinjara /knl/	5/3
Antaŭ 70 jaroj fondiĝis Esperantista Klubo en Praha/Kníchal/	6/3
Elstara fakulo kaj ŝatata homo /V.Novobilský pri T.Pumpr/	7/3-4

BELETRO, RAPORTAĴOJ

Ekskurso al Ostrý /J.Kořínek/	1/1
Mangu kortbirdaron - ĝi estas saniga /A.Gregor, trad.vk/	1/5-6
"Al mia jam malnova amiko" /O.Kníchal/	5/7
Ok mielaj tagoj en Rimini /S.kaj P.Polnický/	5/7
Hazarda edziĝo /Kim Lan/	6/6-7
Somero en Leningrado /R.Horský, trad.J.Hoffner/	8/6

RONDETA VIVO

1/4,2/3,3-4/5,5/8,6/10,7/8,8/3

Bor u Tachova /1x/, Brno /5x/, Gottwaldov /1x/, Hradec Králové /1x/, Jablonec n.Nisou/2x/, Kraslice /1x/, Kyjov /2x/, Liberec /1x/, Mělník /4x/, Frýdek Místek /2x/, Olomouc /1x/, Opava /1x/, Ostrava-Poruba /2x/, Ostrava VŽKG /5x/, Paskov /1x/, Pardubice/2x/, Písek/1x/, Praha/5x/, Šumperk /3x/, Vsetín/2x/, Ústí n.L./1x/, Znojmo /3x/.

SAMIDEANA KRONIKO 8/3, 1/4, 2/2, 3-4/6, 5/8, 6/10

OKÉNKO DO SEKRETARIÁTU 1/11,3-4/11, 6/12

KORESPONDI DEZIRAS 1/12,2/8,3-4/12, 8/8

LA ESTRARO DE ĈEĤA ESPERANTO ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE STARTO DEZIRAS AL ĈIUJ FELIĈAN KRISTNASKON KAJ SUKCESAN NOVAN JARON !!!
